



Sameoj
El nia literaturo
Kvizo

INERNACIA ESPERANTO-REVUO DE
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

ILEI

SEPTEMBRO 1999

N-ro 3 (90)

Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vortradikojn. Tiuj ĉi vortoj aperis en: *Esperanto, Minimum szótár* (1995), kiu jam plene elĉerp'igis. Nun ili estas alireblaj en Interreto, en la hejmpaĝo de Juna Amiko: <http://banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

Krom-signoj, kiuj helpas komenc'antojn.

Divido-streko(-) troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

Vertikala strek'eto (') signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'igi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuitaga (tt) aŭ la vorto revenas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino ...) ni ne uzas kromsignojn.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo



*Sur la titol'paĝo:
Karakteriza
Samea
pejzaĝo somera
kun boaco*

Verax egal'eco!!!

Kiam mi verkas ĉi tiun artikol'eton, 200 kilometrojn sude de mi denove "parolas la arm'iloj". Plur-jara mis-kompren'emo inter Serboj kaj Albanoj en Kosovo rezult'igis teruran militon. Suferas milionoj da senkulpaj infanoj kaj plen'kresk'uloj, ĉiu-semajne mortas centoj da kompat'ind'uloj.

Kial?

Post tiom da historiaj spertoj, kial la hom'aro ne venas al klara re-kono de evidenta fakto: ne ekzistas etnoj superaj kaj malsuperaj. Kiel longe oni povas ankoraŭ libere veneni animojn per ĉia-speca destino¹ pri supera kvalito, sia-flanke, kaj pri sen-valor'eco, ali'flanke. Kiel longe oni toleros super si la sem'antojn de mal-paco kaj veng'emo? Kiel longe regos ankoraŭ inter ni sango-soifaj sovaĝ'bestoj?

Karaj amikoj, ne fidu tiujn, kiuj volas kredi ĝi al vi, ke vi estas pli valora ol via najbaro, ke vi meritas pli ol homo el alia etno, raso, sekso aŭ religio. Ĝis plen'plena kompreno kaj sen-manka real'igo de la ideo pri vera egaleco kaj just'eco inter ĉiuj homoj, ni povas nur mal-ami kaj murdi, sen-halte re-pagi pro tiaj aŭ aliaj ofendoj veraj aŭ imag'itaj. Komprenu, fin'fine, ke diferenc'igado laŭ diversaj ŝajnaj disting'iloj, povas konduki sole al pere².

Geza Kurucz
redaktoro

1. antaŭ-difin'ita tasko, sorto / 2. morto, neni'igo.

LANDO DE SAMEOJ



En la plej norda Eŭropo, norde de la Polusa¹ cirklo, troviĝas la Samea lando. Ĝi ne estas aparta ŝtato, sed nur distrikto² divid'ita inter Norvegio, Svedio, Finnlando kaj Rusio kaj de-longe loĝ'ata de homoj, kiuj nomas sian teron Sápmi kaj sin mem Sámi. Nun-tempe la pli-multo de la loĝ'antoj tamen konsistas el poste-uloj de sudaj en-migr'intoj³ (Finnoj, Norvegoj, Svedoj, Rusoj kaj aliaj) kaj ilia lando estas pli bone kon'ata per la nomo Lap'lando aŭ Laponio. Ekster-uloj simpl'igas la aferojn, nom'ante la loĝ'antojn Laponoj aŭ Lap'land'anoj, ĉar ili, simple, ne scias pri la diferenco inter Laponoj kaj Sameoj.

Antaŭ-longe Sameoj vivis kiel nomadoj⁴. Ili bredis⁵ boacojn⁶, fiŝkaptis kaj ĉasis. Ili loĝis en facile mov'eblaj ledaj kaj tolaj tendoj⁷. Kun la tempo, sud'uloj pli kaj pli inter-venis en la vivon de la Sameoj, komencis konverti⁸ ilin

al krist'an'ismo, postuli felojn⁹ kaj, poste, impostojn¹⁰. Ili dev'igis la Sameojn sendi siajn infanojn al la lernejoj de la suduloj, kie la infanoj fremd'iĝis de siaj kulturo kaj lingvo, ĉar pro longaj distancoj ili vizitis sian hejmon nur dum la ferioj. En la lernejo oni mokis kaj punis ilin, se ili parolis en sia samea lingvo. (Ankaŭ nun la lernejo povas trovi¹¹ 60-100 kilometrojn for de la hejmo, sed la infanoj rajtas lerni en sia lingvo kaj taksioj¹² aŭ aŭtobusoj re-heim'igas ilin ĉiu-tage.)

De antaŭ kelkaj jar'dekoj Sameoj pli kaj pli defendas siajn rajtojn. Ek-de 1986 la Sameoj havas propran flagon, kies brilaj koloroj (blua, verda, flava, ruĝa) estas la samaj kiel en la sameaj festo-vest'aĵoj kaj ĉapoj. La cirklo en la flago simbolas¹³ la sunon kaj la lunon. Sameoj pensas, ke ili estas ge-filoj de la suno. Ilia "nacia tago", aŭ ĉu diri pre-fero "etna tago" estas la 6-a de febr-ru-aro.



Samea hejmo




Sameoj skias per unu bastono

Kelkaj Sameoj migris en urbojn aŭ ekster-landen. Kelkaj far'ig'is redak-toroj, instruistoj, profesoroj¹⁴, pasto-roj¹⁵, kurac'istoj, art'istoj. Neniu plu daŭre loĝas en tendo. La bred'ado de boacoj iĝis pli mal-facila, ekzemple tial, ke Eŭropa Unio ne permesas la tradician buĉ'adon¹⁶ de boacoj fare de la posed'antoj mem, sed la bestoj devas esti trans-port'ataj al moder-naj buĉ'ejoj, kiuj situas centojn da kilometroj for de la paŝt'ejoj. Motor'sledoj¹⁷ anstataŭas la boacojn kiel trans-port'iloj.

Multaj Sameoj sentas, ke ili estas ekspluat'ataj¹⁸. Iliaj lando kaj kul-turo estas uz'ataj por allogi turis-tojn, kaj ili mem, kun siaj vestaĵoj kaj man'far'it'ajoj estas ekspozici-ataj¹⁹ kvazaŭ bestoj en besto-ĝar-deno. Antaŭ ne tre longa tempo, suduloj volis pruvi, ke la Sameoj estas iu mal-supera raso²⁰. Iliaj kra-nioj²¹ estis "science" mezur'itaj kaj ili estis fot'itaj tiel, ke ili aspektis mal-junaj, mal-sanaj kaj mal-belaj.

Ekde 1998 en Inari, Finnlando, troviĝas samea muzeo "Siida", kiu

provas montri la verajn sameajn historion kaj kulturon tiel, kiel ili mem volas, ke ĝi estu prezent'ata. Dum la vintro 1998-99 ili ankaŭ havis film'festivalon en Inari, kie unu el la ekranoj²², far'ita el glacio, estis star'ig'ita sur la lago Inari. Oni spektis²³ la filmojn sub-ĉiele, en mult'grada frostoj. Estis prezent'ataj filmoj, far'itaj de Sameoj mem, kio ne ofte okazas. Unu el la filmoj havas la titolon "Donu al ni niajn skeletojn²⁴". Ĝi prezentas la luk-



Boaco kaj ĝia jung'aĵo

ton de norvegaj Sameoj, kiuj pledis por sia etno kaj volis el-preni la skeletojn de siaj praaĵoj el la mu-zeo, kie ili estis ekspoziciataj kiel skeletoj de krim'uloj kaj murd'istoj.

Sameoj havas tute specialan kan-to-stilon "jojku", per kiu ili arte prezentas siajn parencojn, kon'atojn kaj am'atojn, sian landon kaj vivon. Jojku-oj estas kvazaŭ kant'ataj po-emoj. Ekzistas ankaŭ sameaj verk-istoj kaj pentr'istoj. Fakte, la samea lingvo ne estas nur unu lingvo. Oni

povas nombri almenaŭ dek tri sameajn dialektojn²⁵. Ĉar la samea legant'aro estas malgranda, la libroj ofte aperas ankaŭ en aliaj lingvoj. Dank' al la libroj suduloj ekkomprenas la sameajn pas-int'econ kaj est'ant'econ. La lingvo kaj kulturo igas la etnon kon'ata kaj agnoskata²⁶. Sen lingvo kaj honesta historio mal-aperas la ident'eco²⁷.

Ĉu la tuttera ek-uzo de Esperanto savus etnajn kaj naciajn kulturojn kaj igus nian mondon pli humana, pli interesa kaj mense pli riĉa?

Raita PYHALÄ, Finnlando

Kolekto 2000

en la kadro de Kampanjo 2000

Vinilkosmo aperigis KD-ojn:

- 1) *JoMo kaj Liber'ed'anoj*:
Liberecana Rok-en-rola
- 2) *Jacques Yvart*:
Esperant'ig'itaj kanzonoj de
Georges Brassens
- 3) *Persone*
La plej fama E-rok-bando
- 4) *Solotronik* la plej avangarda E-elektonika muziko
- 5) *Merlin Esperante*: poprok-bosa
jazo brazila en Esperanto

Mendu ilin ĉe EUROKKA:
FR-31450 Donneville, Francio

1. polusoj suda kaj norda: frost'egaj regionoj de la ter'globo / 2. parto de urbo aŭ lando / 3. loĝ'antoj, ven'intaj el aliaj landoj / 4. homoj, kiuj ne havas konstantan loĝ'ejon kaj pasas de loko al loko / 5. zorgis pri bestoj / 6. 4-pieda besto kun kor'aro (vidu la bildon) / 7. mov'eblaj loĝejoj el tolo aŭ ledo / 8. akcept'igi religian kredon / 9. harplenaĵn haŭtojn de bestoj / 10. certa-procenta pag'end'aĵo al ŝtato aŭ eklezio / 11. fizike trov'igi / 12. lu'eblaj aŭtomobiloj / 13. el-vokas ideon / 14. instruistoj en superaj lernejoj / 15. profesiaj religi'uloj / 16. buĉi: mort'igi beston / 17. sledo: glitvetur'ilo / 18. ekspluati: labor'igi kaj el-tiri plusan profiton / 19. el-me'ataj al la publiko / 20. individuo kun siaj karakterizaj trajtoj / 21. kap'ostoj / 22. bild'ejoj de televidiloj / 23. rigardis programon / 24. ost'arojn / 25. vari'aĵojn de iu lingvo / 26. rekon'ata / 27. konscio pri sam'eco.



*Samea virino teksas rubandon
Ilustraĵoj de Yrjö Kokko [Irje Kokko]*

Ne forgesu pri la

KVIZO!

La nomoj de la plej sukcesaj solvintoj ĉiam aperas en la revuo (vidu la paĝon 18). La plej bonaj konkurs'antoj ricevos jar-abonon por Juna Amiko.

Kiel dir'ite, en ĉiu numero ni publik'igas bildojn el nia literatura heredaĵo per la plumo de nia kun-laboranto, el-stara islanda poeto, **Baldur RAGNARSSON**. Konsciu, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

4

T iuj poemoj² de Zamenhof (*La Espero*, *La Vojo*, *Al la Fratoj*, *Preĝo sub la verda standardo*³, *Al la "Esperantisto"*) diras al ni multon pri lia persono, pri lia idealismo, lia fido al sia kre'aĵo, la lingvo mem, kaj la servo, kiun ĝi povus fari al la hom'aro. Tamen, tiuj kvin poemoj estas publikaj, iel oficialaj, ilin karakteras optimismo⁴, kiu celas instigi⁵ la adeptojn⁶ de la lingvo al plia kaj daŭra laboro. Sed li verkis ankaŭ tri pliajn poemojn, kiuj pli rekte, pli intime⁷ esprimas la sentojn de lia koro. Tiuj estas *Ho, mia kor'*, *Mia Penso* kaj *Pluvo*.

En la unua li esprimas sian angoron⁸ pro dubo, kiu rongas⁹ lian koron:

*Ho, mia kor', ne batu mal-
trankvile,
el mia brusto nun ne saltu for!
Jam teni min ne povas mi facile,
Ho, mia kor'.*

*Ho, mia kor'! Post longa labor'ado
Ĉu mi ne venkos en decida hor'!*

BILDOJ EL LA HISTORIO

*Sufiĉe! Trankvil'igu de l' bat'ado,
Ho, mia kor'.*

Ĉu Zamenhof verkis tiun poemon ĝuste antaŭ la publik'igo de Esperanto, oni ne scias, sed ekzistas tradicio, ke tiel estis. Ekzistas informo de Zamenhof mem (en lia fama letero al rusa esperantisto, *N. A. Borovko* pri la de-veno de Esperanto), ke en tiu tempo li verkis poemojn en la nova lingvo. Li mencias aparte la poemon *Mia Penso* kiun li aper'igis kun *Ho, mia kor'* en la *Unua Libro* (1887).

Mia Penso esprimas senton de perd'igo, en kvar strofoj¹⁰ la poeto bedaŭras la perd'itan jun'econ,

kiun simbolas parol'ado "kun fraŭlino ripoz'anta / post somera promen'ado", li parolas pri sia juneco, kiun li "plor'anta" metis "sur la altaron"¹¹ / de la devo ordon'anta". Kio estis tiu devo? Probable¹² lia obseda¹³, tempo-raba laboro en la kre'ado de la lingvo, lia penso mem:

5

La poemo *Pluvo* diferencas de la ceteraj poemoj de Zamenhof. Ĝi ne koncernas Esperanton, sed nur lian propran personon. La sonoj de la senĉese fal'antaj pluvo-gutoj, frap'ig'antaj sur la strato, mal-fermas al la poeto al-iron al re-memo-roj, kaj la pas'inta tempo re-

LITERATURO DE LA ESPERANTA

*Mia penso kaj turmento¹⁴,
Kaj doloroj kaj esperoj!
Kiom de mi en silento
Al vi iris jam oferoj¹⁵!*

viv'iĝas en lia menso¹⁶. La poemo ne esprimas angoron¹⁷ aŭ internan konflikton¹⁸, nur mildan melankolion¹⁹, kiu tamen ne sentiĝas negative, la poeto re-sentas la freŝon de sia jun'aĝo, li *spiras*:

*Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj
pluvas*


*Senĉese, senfine, senhalte,
El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
Are gutoj frap'iĝas re-salte.*

*Tra la sonoj de l' pluvo al mia
orelo*

*Murmur'ado penetras²⁰
mistera²¹,
Mi rev'ante²² aŭskultas, mi volus
kompreni,*

Kion diras la voĉo aera.

Trezorejo de originalaj poemoj en Esperanto



*Kvazaŭ ia sopir²³ en la voĉo
kaŝ'igás
Kaj aŭd'igás en ĝi re-memoró ...,
Kaj per sento plej stranga,
mal-ĝoja kaj ĝoja,
En mi batas konfuzo²⁴ la koro.*

*Ĉu la nuboj pasintaj, jam ofte
vid'itaj,
Rememore en mi reviviĝis,*

*Aŭ mi revas pri l' sun', kiu
baldaŭ aperos,
Kvankam ĝi en nuboj kaŝ'igís?*

*Mi ne volas esplori la senton
misteran,
Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
Ion freŝan mi sentas, la freŝo min
logas,
Al la freŝo la koro min tiras.*

6

Zamenhof abunde kaj kristal'klare pruvis per siaj prozaj²⁵ verkoj, ke Esperanto estas plene taŭga lingvo por esprimi profundan kaj logikan pensadon. Sed jam en la komenco li ankaŭ volis montri, ke la nova lingvo estas ankaŭ kapabla esprimi intimajn sentojn en la formo de poezio²⁶. Li tamen, ver'ŝaj-

ne, ne rigardis sin kiel poeton, li volis nur montri la vojon al tiuj, kiuj pli sin-done deziras plu-iri sur tiu vojo. Kaj la atendo ne estis longa, la Esperanta poezio jam akiris siajn flug'ilojn kaj baldaŭ levos sin al flugo de esploro malferm'onta novajn perspektivojn²⁷.

Baldur RAGNARSSON, Islando

1. tio-kion oni ricevas de antaŭuloj / 2. verko de poeto / 3. flago / 4. fido pri ĉiama sukcesa fino / 5. fari cel'konscia kaj aktiva / 6. sekv'antojn / 7. kor'proksime / 8. kor'premon / 9. ĉirkaŭ-mordas / 10. vers'aroj / 11. sanktan tablon de preĝ'ejo / 12. tre ver'ŝajne / 13. anim'prema / 14. turmenti: intence kaŭzi al iu fortajn dolorojn / 15. oferi: mem-vole doni, donaci / 16. nesto de pensoj / 17. kor'doloron / 18. inter-puŝ'igon de pensoj kaj sentoj / 19. ne-intensa malbona humoro / 20. per-forte en-iras / 21. sekreto-plena / 22. re-memor'ante / 23. dezir'ego / 24. mal-regule / 25. ne-versaj / 26. vers'arto / 27. al-rigardojn al novaj horizontoj.

Se vi havas al-iron al Interreto,

VIZITU LA HEJM'PAĜON DE JUNA AMIKO


<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto/>

Vi trovas tie, inter-alie, la *en-havon* de la plej freŝa numero kun fragmentoj, la plenan liston de niaj *per-antoj* kun *abon'prezoj* por 2000 kaj la tutan *vor'liston* (1500), kiun uzas nia revuo sen pied'notoj.



Vagonaro

Blazio VAHA
Hungario



*Iras vagon'aro,
kuras vagonaro.
Ĝiaj radoj neĝon plugas,
ĝia fumo alte flugas.
Ĝi atingas jen, stacion —
ĝi el-vokas sensacion¹.*

1. knan novaĵon.

PIED'NOTOJ por "Kunikla kunpuŝiĝo"

1. kuniklo: lepor'simila dom'besto / 2. bosko: arbar'eto / 3. pledi: paroli por defendi ion aŭ iun / 4. vori: manĝ(eg)i / 5. preskaŭ aŭtomate / 6. ekster-ordinare grandega / 7. mal-seriozis / 8. kap'tit'aĵo / 9. sento de kap'turno / 10. re- aŭ al-veno al religia kredo / 11. mar'monstron / 12. sin-liber'iĝo / 13. forta karakteriza trajt'aro / 14. troi: kur'e'ti / 15. mem-ŝat'ego / 16. besto-monstro / 17. hipnoto: fort'ega intenca psika efiko sur iun.

Konsilo por Instruistoj

Nia poemo pri kuniklo (p. 10-11) ja ne estas skribita en tre simpla lingvaĵo, sed la rakonto povos plaĉi al etuloj. Ne timu foje laŭtlegi materialon en flua Esperanto al komencantoj. Eblas aŭdigi vortojn kaj konstruojn, kies aktivan uzon oni ankoraŭ ne postulas.

Antaŭ ol deklami la poemon preparu la vojon: faru nacilingvan senco-tradukon aŭ resumon, por ke ili komprenu la situacion. Starigu motivigan babiladon: Kiu posedas, posedis kuniklon? Kie ili vivas? Kion ili manĝas? Kion ili faras fronte al danĝero? Kaj ĉu vi? Ĉu kunikloj estas bravaj? Ĉu vi estas brava? Ĉu vi foje troigas? ...ktp.

Ni ne havas sufiĉan spacon pied-noti, kiel kutime, ĉiujn nekonatajn vortojn, helpu nin, ni petas.

KUNIKLA¹ KUN-PUŜ'IĜO

"Ludi boske² estas tede"
diris Kuni plende-plede³.
Kampen iri, tion ĝi volis.
Ĝis konsento ĝi petolis.
La kunikl'ido kun persisto
Kontraŭis al patrin'rezisto.

Avertis ŝi mien'severe,
"Restu hejme vi prefere,
Ĝuste ĉi-sezonas la giganto,
Aktualas tago de l' vor'anto⁴.
Pro kampo-monstro graŭla
Via onklo iĝis ree fraŭla!"

"Mi pli bravos kaj atentos,
Danĝeron mi instinkte⁵ sentos"
respondis ido kun mem-fido.
"Se monstro venos en la vido,
Vi re-kuru hejmen tuj,
Sekure al la karot'uj!"

For-lasis boskon ido sen-informa,
Kun tornistro kaj enorma⁶
Sci'volo sur la kampo agra,
Sed scio mem – tute magra!
Averto panja, urĝa, forta
Ignor'ata dum for-ir' risorta.

Spert'ita tute la unuan fojon,
Herb'eja bunto donis ĝojon.
Tra horoj pluraj ĝi frivolis⁷,
Resti eĉ pli longe ĝi ek-volis.
Sed meze de la iksa-salto
Venis ĝi al frosta halto.

Tra la tigoj de la kampo
Fulmis du blind'igaj lampoj,
Ne sciis ĝi, ke preta grajno
Bezonas trakton de kombajno.
Al maŝinoj Kuni ne kutimis,
Do kunikl'eto ege timis.

Ĉu for-kuri – save, fuŝe
Ĉar la monstro venis muĝe?
Ne! Ĝi rigid'iĝis. Jen statuo
Antaŭ terur'ega luma duo.
Pro falĉo-faŭka aĉ-demono
Ĝi solid'iĝis pli ol ŝtono.

Ferm'itaj la okuloj firme
Kovr'itaj per piedo ŝirme.
Vivo-historio pasis en imago
De komenca ĝis la nuna tago.
Ateismo for; iĝ'inte predo⁸
Al kuniklo venis kredo.

Trafis ĝin ja kap'vertiĝo⁹
Pro fulmo-bata konvert'iĝo¹⁰
Al kunikla dio, trema preĝo
"Savu min de l' ĝangalleĝo".
Kaj savo venis efektive
Dum ĝi tremis tut'pasive.

Stir'isto estis vir' hard'ita
Kaj tamen ene dolĉ'spirita.
Pro siluet' orelo-para
Lev'iĝis sento vivo-ŝpara.
Bremsis li la levjatanon¹¹,
Kuniklon prenis en la manon.

Ĝin am'eme flanken metis
Dum komplete li rid'etis.
Post kareso de la kapo,
Lasis ĝin al for-eskapo¹².
Tamen pasis horoj plene du,
Ĝis kuniklo movis plu.

Kuraĝ' re-venis nur et-gute,
Okulon unu ĝi mal-fermis – eĉ ne tute.
Monstro ŝajnis esti plene for.
Okulo dua, post plia hor'
Venis reen en funkci'
– Sekura ĝi – ĝoj'emoci'.

“Ne sen-kaŭze monstro fuĝis
Ĝi klare rampis plu ĝis
renkonto kun la pensoj miaj
kun efikoj sensaciaj.
Sent'ebelis mia ega bravo,
Ĝi sin deklaris mia sklavo.


Forir'ordonon mian ĝi respektis,
Obeis min, min ne difektis
ĉar karismo¹³ mia el-radiis.”
Tiel plue Kuni fantaziis,
Kaj for-trotis¹⁴ kun orgoĵo¹⁵
Al la fora boska sojlo.

Hejme al la parenc'aro
Ĝi rakontis pri la faro:
“Tre proksime venis drako¹⁶
Fajro-buŝa dum atako
Flug'ilo ĝia mian kapon
Trafis – sentis mi la skrapon!


Ĝiaj ungoj ŝvebis super mi,
Ĝis volo-forto mia pezis pli.
Kun hipnota¹⁷ koncentr'igo,
Mem-fid'ego kaj prestiĝo,
Gajnis mi la pens'konflikton,
Kaj ĝi for-lasis la distrikton!”

Kuzoj, fratoj, admir'antoj,
Spert'uloj, inoj, diletantoj
Por aventuro ekis ardi
“Ho, kune iru ni rigardi
Lokon de la lukto spuru
Kuni, gvidu nin, ekkuru!”

Re-age al komuna vok'
“Mi opinias, ke la ĝusta lok”,
diris ĝi post paŭz' momenta
“Plej justa kaj prudenta
Por heroo kun merito
Estas resti en la lito.”



PIED'NOTOJ sur paĝo 9.



RIDU!

*Desegnis:
Karina*

* Ŝercoj de Hajnal MACGILL

Antaŭa rado de biciklo:

“Atentu, venas erinacssssssssss!”

Mal-antaŭa rado de biciklo:

“Pro la averto mi dankassssssssss!”

Jun'ulo volas en-iri la mar'armeen.

Dum la inter-parolo:

Kapitano: Ĉu vi scias naĝi?

Junulo: Kio? Ĉu vi ne havas sufiĉajn ŝi-
pojn?

* Ŝerco de Karina MACGILL

Mateo: Kial elefanto havas ruĝajn oku-
lojn?

Klara: Por ke ĝi povu sin kaŝi en ĉeriz-
arbo.

Mateo: Mi ne kredas! Mi neniam vidis elefanton en ĉerizarbo!

Klara: Vidu, kiom efike ĝi kaŝas sin!

* Ŝerco de Panjo Maria

Instruistino gvidis grupon da infanoj tra arbaro. Per radio oni informis, ke urso de cirko eskapis¹ kaj kuris en tiun arbaron.

“Ni tuj for-iru el la arbaro”, ŝi diris al la infanoj. “Tiu urso estas danĝera.”

“Kial?” demandis lernanto.

“Ĉar ne gravas, kiom rapide vi kuros, ĝi kuros pli rapide.”

“Do, mi grimpos sur arbon!” decidis la lernanto.

“Tio ne helpas”, respondis la instruistino. “Ne gravas, kiom rapide vi grimpos, la urso grimpos pli rapide.”

“Do, mi kaŝos min”, diris la lernanto.

“Tio ne helpas”, respondis la instruistino. “Ne gravas, kiom rapide vi kaŝos vin, la urso kaŝos sin pli rapide.”

* Ŝerco (ĉu?) de Paĉjo Steĉjo

Demando: Kio estas la diferenco inter amatoro² kaj profesi'ulo?

Respondo de profesiulo: Amatoro ekzercas, ĝis eblas plen'umi taskon ĝuste. Profesiulo ekzercas, ĝis ne plu eblas plenumi ĝin malĝuste.

Respondo de amatoro: Amatoroj konstruis la arkeon³, profesiuloj konstruis la ŝip'egon “Titanic”.

1. for-kuris, sin savis el mallibero / 2. ne-profesi'ulo / 3. granda sur-akva vetur'ilo; arkeo de Noa.

Ĉiu viv'anta llingvo evoluas

Ĉiu el vi rimarkis, ke uz'ata lingvo ŝanĝiĝas, evoluas. La junuloj parolas alie ol la maljunuloj. Ili komprenas unu la alian, tamen kelkaj vortoj estas ne-kompren'ataj aŭ havas alian sencon. Sciu, ke ĉiu lingvo konsistas el gramatiko (reguloj de la frazo-konstru'ado) kaj ar'ego da vortoj (simboloj de objektoj, agoj, statoj kaj aliaj). Gramatiko ŝanĝiĝas apenaŭ rimark'eble, male, la vortoj ne estas tiel stabilaj. Ilia uz'ado multe de-pendas de la individuo (ĉiu havas siajn prefer'atajn vortojn) kaj de la epoko kun sia specifa² kulturo.

Kial mortas kaj nask'iĝas vortoj?

Se io mal-aperas el nia vivo, iom post iom malaperas aŭ arkaik'iĝas³ ankaŭ la vorto kaj male, kiam oni ek-uzas novan produkt'ajon venas kun ĝi ankaŭ la nomo kiel, ekzemple, *satelito*, *kompakt'disko* aŭ *KD*, *print'ilo* kaj aliaj.

Kiel naskiĝas novaj vortoj?

Ekzistas du manieroj. Laŭ la unua, ĉiu lingvo havas rimedojn (ekzist'antaj afiksoj⁴ aŭ vortoj) fari novajn vortojn. Vidu, ekzemple, la vortojn: *spac'vetur'ilo*, *hejm'paĝo*, *vid'bendo*, *komput'ilo*. Dank' al afiksoj kaj vort'kun-metoj, Esperanto havas multajn ebl'ecojn krei novajn vortojn.

Aŭ ĉu eviti tiujn kunmet'ajojn (kelkaj el ili vere estas pezaj) kaj prunti kun la ajo ankaŭ la nomon, kiu plej ofte, internaciĝas kune kun la uzo de la objekto. (Vidu ekzemple: *ekrano*, *fajlo*, *lasero*, *astronaŭto*, *bajto*, kaj aliaj.)

Kio estas neologismo?

Nova vort'radiko, kiu antaŭe ne estis uz'ata en la lingvo. En la unuaj tempoj oni kalkulis neologismo, ekzemple, la vorton '*aspekt'*', ĉar por ĝin esprimi oni uzis '*el-rigard'*'. Nun, '*el-rigard'*' ne plu estas uz'ata, ĉar '*aspekt'*' plene el-puŝis la komencan formon. Hodiaŭ neniu diras: "*Vi elrigardas malsana*", la vorto '*elrigard'*' fariĝis, do, arkaismo. Sed neologismo ni nomas la vortojn eĉ nun-tempe: *bunta* (anstataŭ 'mult'kolora'), *olda* (anst. 'mal-juna'), *aperti* (anst. 'esti mal-ferma'), *aŭdaca* (anst. 'kuraĝ'ega'), prezidento (anst. ŝtat'prezid'anto) kaj tiel plu.

Kiun opinion havi pri neologismoj?

Pluraj volas sendi ilin al infero, dirante, ke Esperanto celas simpl'econ. Grand'ega nombro da vortoj, kiujn oni devas teni ĉiam pretaj en la memoro, povas tre mal-facil'igi la lingvon. Por neniu estas egale, per kiom da vortoj li povas sin esprimi, ĉu per 5000, aŭ sufiĉas la duono. Mi rekomendas al vi eviti ilin en simpla konversacio.

Aliflanke, ne forgesu, ke Esperanto volas fariĝi universala lingvo, per kiu oni povas esprimi ĉion: ĉef-verkojn belliteraturajn, fakajn kaj por tio 2500 vortoj tute certe ne sufiĉas. Estas, do, utile, senĉese riĉ'igi vian vortrezoron, se vi volas ĝui ĉiujn nuancojn⁵, la plenan bel'econ de Esperanto.

Geza KURUCZ

1. novaj vortoj, kiujn ne ĉiu komprenas / 2. propra nur al iu afero, ĉi tie: epoko / 3. arkaika: mal-nov'ega / 4. kiel ge-, mal-, -ej, -in ... / 5. delikatajn detalojn, diferencojn.

KONTAKTO

estas la sekva ŝtupo post *Juna Amiko*

KONTAKTO estas leg'ata de ĉiu kiu interes'iĝas pri la mondo

Kontakto estas la revuo de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) kaj el-donas ĝin UEA (Universala Esperanto Asocio). Multaj (ankaŭ mi) konsideras ĝin la plej interesa kaj moderna revuo en Esperantujo. Ĝi estas grand'formata (21x30 cm) 16-paĝa, bele ilustr'ita (kun plen'kolora kovr'ilo) jun'ul'eca revuo, kiun legas homoj en pli ol 90 landoj tra la mondo. *Kontakto* aperas ses fojojn jare kaj kontribuas al ĝi ge-junuloj el la tuta mondo. La enhavo estas tre diversa. Vi trovas en ĝi aktual'ajojn, novelojn¹, fabelojn, enigmojn kaj multon alian. Parto de la artikoloj aperas en lingvo facila aŭ tre facila, sekve ankaŭ la legantoj de *Juna Amiko* povas ĝin kompreni.

La redaktoro estas *d-ino Sabira STAHLBERG*, kiu loĝas nun en Bulgario kaj estas aŭtoro² de pluraj libroj en Esperanto.

Kiel ricevi KONTAKTON?

Individuaj³ membroj de TEJO ricevas ĝin aŭtomate. Se vi ne estas individua membro, vi povas ĝin aboni pere de via kotiz'per'anto aŭ rekte ĉe UEA, Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, rete: <uea@inter.nl.net>. Por grupoj ekzistas rabato⁴ de 40%.

Se vi estas sci'vola pri la mondo, legu KONTAKTON!

1. mallongajn prozajn verkojn / 2. kiu verkis librojn / 3. kiuj an'igis kaj pagas membro-kotizon / 4. mal-all'igo de prezo.



Gust'um'ajo el la revuo KONTAKTO (2/1999, p. 28)

fikcio

Nekutima ŝoforo

Teksto kaj bildo de *Raymond LECAT*, Egiptio

Surstrate, kondukante kaj preterveturante alian aŭton, mi jetis rigardon sur la apudan ŝoforon, kaj eksaltis. Plene komforte sur la sidejo troviĝis hundo stiranta, kun la antaŭaj piedoj sur la stirilo. Ĝi rigardis rekten antaŭ si, tre atentema pri la trafiko. Mirigita kaj stultigita mi malakcelis, kaj lasis la alian veturilon min preterpasi. Ĉu vere eblas, ke hundo kondukas veturilon en la trafiko... kaj havas pasaĝeron? La persono sur la dekstra seĝo apud la hundo aspektis tute normale.

Fine la aŭto malakcelis, perfekte flankeniĝis laŭ la trotuaro kaj haltis. Ĝia dekstra pordo malfermiĝis, kaj mi vidis la akompananton eliri la aŭton, sekvate de la hundo. Mi haltis tuj malantaŭ ilia aŭto, kaj ankaŭ eliris, kun demanda mieno. La kunparolanto (ne la hundo!) ekridetis, kaj montris al ŝildeto sur la tegmento de sia veturilo:

– Jen, kiel vi vidas, mi laboras ĉe aŭtolernejo. Dum la konduklecionoj mi okupas ĉiam la dekstran seĝon, kaj la lernanto sidas ĉe la stirilo. Sed la aŭto estas du-ila: akcelilo, kluĉilo kaj bremsilo havas ankaŭ pedalojn sur la dekstra flanko. Ĉiun mismanovron de la lernanto mi povas tiel malebligi, aŭ kontraŭagi, ankaŭ por la direkto, ĉar mi ĉiam povas gvidi la stirilon per la maldekstra brako.

Mi do ĉiam restas la mastro. Je la fino de mia deĵoro, kiam la lasta lernanto forlasis la veturilon, mi ne bezonas ŝanĝi la seĝon. Mi revenas hejmen kondukante el la dekstra seĝo, kaj mia kompleksema hundo, dormetinte dum la lecionoj malantaŭe, tiam ŝatas "preni la stirilon".

Do, se vi iam vidas hundon, aŭ eĉ simion, kiu stiras aŭton, ne eksaltu aŭ maltrankviliĝu: temas pri aŭtolernejo, kaj apude sidas instruisto!





Ĝoj'plenaj / tragikaj¹ du minutoj

Du minutoj levas al la ĉielo de absoluta ekstazo² kaj puŝas al la plej-profundo de mal-espere. Eksterulo (Hungaro), kiel mi, tiel povas karakterizi la lastajn du minutojn de la ĉi-jara futbala finalo³ de Eŭropo.

Centojn da fojoj mi aŭdis, ke *la pilko estas glob'forma*⁴ alud'ante⁴ per tio, ke en pilk'ludoj (precipe en futbalo) ĉio povas okazi, tamen, ĝis nun mi ne konsideris tion serioze. La ĉi-jara finala matĉo⁵ inter **Manchester United** [Menĉester Junajtid] (Britio) kaj **Bayern München** [Bajer Minĉen] (Germanio) pruvis, ke la dirajo estas vera. Ĝis la 90-a minuto ŝajnis ke Bayern München gajnos la spiratan⁶ Pokalon. Ĉiu atendis la fin'fajfon de la lud'estro, kiam Manchester United atingis golon⁷ (1:1). Sekvos, do, duoble 15-minuta pli-long'igo, opiniis la zelotoj⁸ en la stadiono kaj milionoj da spekt'antoj⁹ antaŭ la televidaj ekranoj¹⁰ tra la mondo. Ankaŭ la zelotoj de Bayern

München akceptis, kun amara koro, ke la matĉo havos 30 minutan koreman daŭrigon. Sed neniu ankoraŭ povis re-konsciĝi el sia ĝojo aŭ malĝojo, kiam sekvis tio, kion Manchester United ne sukcesis atingi dum 89 minutoj. *Solksjaer* atingis la duan golon kaj tiel, en du minutoj, ĉio radike ŝanĝ'iĝis, el malgaj'egaj anglaj zelotoj, perd'intaj ĉiujn esperojn, fariĝis ekstaze salt'antaj, radie rid'eg-antaj frenez'uloj; male, la germanoj, kiuj antaŭ du minutoj firme kredis, pri

sia venko, subite falis el la sepa ĉielo de feliĉo en la mezon de fajro-plena infero¹¹. Multaj mez'aĝaj seriozaj plen'kresk'uloj amare ploris kiel bat'ita infaneto.

Kaj mi, eksterulo – por kiu, ĉi-foje la rezulto ne estis aparte interesa – komprenis, kiel ekster-ordinare **gravan** rolon havas **emocioj**¹² en la vivo.

Zoltan KURUCZ



David Beckham

1. terure mal-gaj'igaj / 2. sen-brida esprim'iĝo de sentoj / 3. fina, ferma parto / 4. cel'ante montri / 5. sport'ludo inter du teamoj / 6. sopiri: dezir'egi / 7. poenton en futbalo, man'pilko k.a. / 8. homoj, arde dezir'antaj la venkon de iu teamo / 9. rigard'antoj de programo / 10. bild'loko de televidilo / 11. post-morta loĝ'ejo de mal-bon'uloj / 12. sentoj.

JEN TRI UTILAJ PROVERBOJ:

Bona vino al la fino.

Laŭdu tagon nur vespere.

Plej bone ridas, kiu laste ridas.

KLASOJ DE KVAZAŬ-LERNEJO TIBOR SEKELJ

Jen la listo de la partopren'antaj klasoj (stato en junio). Vi povas atingi ilin Interrete (<http://ips.uniroma3.it/kler>) aŭ letere (Mauro La Torre, Dipartimento di Scienze dell'Educazione Terza Universita' di Roma, Via del Castro Pretorio 20, IT-00185 Roma, Italio). Vidu nian artikolon en la antaŭa numero sur paĝo 3 (2/99).

al	Albanio	Tirano	m	<i>Selimi (Mezini), Bardyl</i>
ar	Argentino	Neŭkeno	m	<i>Sanchez, Ruben Luis</i>
au	Aŭstraliao	Perto	m	<i>Vos, Penelope (Penny)</i>
ba/1	Bosnio-Hercegovino	Zenica	b	<i>Dizdarević, Jusuf</i>
ba/2	Bosnio-Hercegovino	Prača	b	<i>Ligata, Bego</i>
br/1	Brazilo	Petropoliso	b	<i>Marinho, Fernando J. G.</i>
br/2	Brazilo	Saopaulo	b	<i>Abreu Marcon, Sonia Maria</i>
br/3	Brazilo	Barra Bonita	m	<i>Issa, Samra; Garcia, Valéria</i>
cl	Ĉilio	Temuko	m	<i>García, Francisco Javier</i>
cr	Kostariko	San-Isidro	m	<i>Salazar, Carlos</i>
fi	Finnlando	Enöntekio	m	<i>Enönmäki, Pekka</i>
fr	Francio	Chateauroux	a	<i>Houviez, Maryvonne</i>
gh	Ganao	Akim-Achiase	m	<i>Ampomah Badu, Frimpong</i>
hr/1	Kroatio	Zagrebo	b	<i>Belošević, Marija</i>
hr/2	Kroatio	Zagrebo	b	<i>Belošević; Gazdek, Martina</i>
it/1	Italio	Prato	b	<i>Pampaloni, Leonardo</i>
it/2	Italio	Romo	b	<i>Bellu, Rosalba</i>
it/3	Italio	Romo	b	<i>Di Nicola, Anna M.</i>
it/4	Italio	Formjo	b	<i>Mastroianni, Rosalba</i>
it/5	Italio	Gizzeria	b	<i>Goffredo, Teresa</i>
jp	Japanio	Oosako	b	<i>Gotoo, Sumiko</i>
ro/1	Rumanio	Bixad	b	<i>Trifoi, Mihai</i>
ro/2	Rumanio	Timiŝoaro	m	<i>Popa, Florica</i>
ro/3	Rumanio	Timiŝoaro	m	<i>Popa, Florica</i>
ro/4	Rumanio	Timiŝoaro	m	<i>Bute, Aurora</i>
tg	Togolando	Lomeo	b	<i>Gbeglo, Koffi</i>
ua/1	Ukrainio	Kijivo	m	<i>Lineckij, Mikaelo</i>
ua/2	Ukrainio	Odeso	m	<i>Auderskaja, Tatjana</i>
us	Usono	Powhatan	b	<i>Maxeze, Bill</i>
uz	Uzbekio	Taŝkento	m	<i>Perevejtajlo, Eŭgeno S.</i>
yu/1	Jugoslavio	Ĉaĉako	m	<i>Petrović, Radojica</i>
yu/2	Jugoslavio	Beogrado	m	<i>Djurović, V. / Petrović, Sonja</i>
yu/3	Jugoslavio	Senta	m	<i>Rac Kleman, Margit</i>

a = antaŭ-lernejo; b = baz'lernejo; m = mez'lernejo

Lernantoj kaj instruistoj! En la komenco de via aktiva laboro por reciproke konat'iĝi, la redakcio de *Juna Amiko* tut'kore salutas vin kaj deziras ĝoj'plenajn traviv'ajojn. Ne forgesu, ke ni ĉiam staras je via dispono, informu nin regule. Dankon!

Ĝis la 1-a de aŭgusto la plej bonajn solvojn (de n-ro 1) sendis:

1-a kategorio (malpli ol 11-jaraj): Anita Körmöndi (22,5), Dávid Tóth (21,5), Renata Román (21,5). *Ĉiuj el Hungario.*

2-a kategorio (11-17-jaraj): Marine Chochoy, Francio (26), Marija Mitevaska, Makedonio (25), Melanie Hedoux, Francio (25)

3-a kategorio (pli ol 17-jaraj): Janet Tidman, Britio (27,5), Aneta Velkoska, Makedonio (27,5), Aleksas Masiukas, Rusio (26,5), Ratka Andonova, Makedonio (26,5). *La ceteraj serĉu siajn poentojn en nia hejm'paĝo (vidu paĝon 8).*

Mike SADLER:

Fal'anta ŝtel'

Ĉe la tablo, lunĉo-hore¹, sidas patro kaj patrin' kun infanoj – sed la hundo, ĝi kie kaŝas sin? Ni rigardu sub la tablon! Jen atendas ĝi silente, kaj se manĝo-peco falas... ĝin for-voras² tre kontente!



Gestoj³: Faru la gestojn sam'tempe kun la vortoj kiujn mi skribas sube per **dikaj literoj** (la bildoj helpas). Komence tenu vian maldekstran manon pugne antaŭ vi kun la man'dorso mal-supre.

Ĉe la **tablo, lunĉohore**: metu la tablon (dekstran manon) sur la maldekstran pugnon (bildo 1) **sidas patro**: etendu la dik'fingron kvazaŭ la patro ek-sidas ĉe la tablo (bildo 2), sed ankoraŭ ne etendu la aliajn fingrojn! **kaj patrin'**: etendu la montro-fingron simile, **kun infanoj**: etendu la ringan kaj etan fingrojn, la meza (hunda!)fingro restas kaŝ'ita sub la dekstra mano! **sed la hundo, ĝi kie kaŝas sin?**: mienu pri-pense! **ni rigardu sub la tablon!**: iom levu la antaŭan flankon de la dekstra mano por vid'igi la hundon.

Jen atendas ĝi silente: sku'etu la hundofingron. **kaj se manĝopeco falas**: fal'igu la dekstran dik'fingron (bildo 3). Ankoraŭ ne movu la hundofingron! **ĝin forvoras tre kontente!**: salt'igu la hundon antaŭen (bildo 3) kaj ĝi manĝu tre kontente!

PIED'NOTOJ de
Falanta ŝtel'

1. en la horo de ĉef-manĝo / 2. vort: manĝ(eg)l / 3. esprim'ivaj korpo-movoj.

PIED'NOTOJ de
Kurulpro (paĝo 20)

1. super-natura bela help'ema persono / 2. indiĝeno: postulo de la pra-loĝ-antoj de iu regiono / 3. Amazonio: regiono de Brazilo / 4. form'antaj angulon 90-gradan / 5. hom-simila besto / 6. mal-antaŭo de piedo / 7. savas sin for-kur-ante / 8. persekuti: sekvi por kapri / 9. nask'onta / 10. mito: imag'ita historia okazaĵo / 11. protekt'anta la naturon / 12. mal-dika fleksi'ig'ema branĉo.

- 1 Konstruu almenaŭ naŭ vortojn per la literoj: *a, e, i, l, o, r, r, t, t, u*.
(Ĉiu vorto konsistu almenaŭ el kvar literoj!) (3 poentoj)
- 2 Kolektu almenaŭ ses vortojn kun ŝajn'afiksoj¹ (ekzemple: *butero* ne *bu'ero*) (3 poentoj)
- 3 Trovu almenaŭ tri sinonimojn (sam- aŭ simil'sencaj vortoj) de '*anonc'*'. (3 poentoj)
- 4 Per afiksoj kreu almenaŭ ses vortojn el '*esper-'*'. (3 poentoj)
- 5 *Mi renkontis amikon kun (sia/lia) amikino. Ili invitis min al (ilia/sia) domo, kie Eva prezentis (ŝian/sian) patrinon.* Elektu la korektajn! (3 poentoj)
- 6 Komplet'igu la proverbon: *Amiko de amiko... ..* (2 poentoj)
- 7 Klar'igu la diferencon inter paronimoj²: *letero-litero, meso-mezo, tusi-tuŝi*. (3 poentoj)
- 8 Invitu viajn amikojn kun-bicikli tra la naturo. (3 poentoj)
- 9 Menciu almenaŭ ok landojn, en kiuj funkcias Interkulturaj klasoj/grupoj. (2 poentoj)
- 10 Kie (urbo, lando) okazos la someraj olimpiaj ludoj en la jaro 2000? (2 poentoj)
- 11 Donu almenaŭ tri verkojn de Marjorie Boulton. (3 poentoj)

La solvojn sendu al: *Marja Belošević, Sveći Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio*
Ret'adreso: <marja.belosevic@esperanto.nu>

1. afiksoj: vort'far'iloj kiel *ge-, bo-, -ist-, -eg ...* / 2. simil'sonaj vortoj

Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 1)

1. *Eva longe forestis, ĉar ŝi havis gripon.**
2. *Mi petis ŝin telefoni al mi, kiam komenciĝos la koncerto ĉi-vespere.**
3. templo, kapelo, katedralo, sinagogo, moskeo, pagodo, sanktejo
4. havaĵo, senhavulo, malhavi, havinda, nemalhavebla, ekhavi, havigi ...
5. *Frostas.*
6. *Sinjorino, bonvolu sidiĝi. / ... preni mian sidlokon.**
7. *Ekde / De(post) la 1-a de junio anstataŭ / (kun) Komisiono pri ...*
8. Komunikilo, per kiu homoj esprimas siajn pensojn kaj sentojn.*
9. "La Esperantisto", 1889, Nürnberg, Germanio, *L.L.Zamenhof.*
10. *Enlitiĝinte Johano baldaŭ ekdormos.*
11. El Hindio.
12. revii / retrovi / kvar, senŝeligi, superulo
* *Ekzistas ankaŭ alia ĝusta solvo.*



Kurupiro estas feo¹ de arbaro kaj pri-zorgas ties bestojn, kresk'ajojn. La aspekto de Kurupiro ne ĉie estas la sama en nia lando. Kutime, ĝi estas alta kiel 6-7-jara infano (kuru = infano, pira = korpo, en indiĝena² lingvo). Ĝi preferas loĝi en truoj de malnovaj

trunkoj, en mallumaj lokoj inter densaj foli'aroj de la kreskaĵoj aŭ ĉe la stranga-formaj aerradikoj de diversaj amazoniaj³ arboj. Tiuj radikoj similas al tabuloj aŭ muroj, kiuj pli-firm'igas la trunkon. Ili staras vertikale kaj estas pli-malpli perpendikularaj⁴ inter si (vidu la bildon).

MENSOG'EMAJ INDIĜENOJ

Vizit'ante indiĝenan vilaĝon la granda Marano, vojaĝ'into de la sep maroj, petis de la trib'estro tri fortajn indiĝenojn por akompani lin en ekspedicio.

– Tiuj estas la plej bonaj por tia vojaĝo. Sed atentu! Nur unu el ili neniam mensogas kaj la aliaj ĉiam mensogas – avertis la tribestro.

Dum la vojaĝo antaŭ ol trans-iri danĝeran riveron, Marano demandis al la indiĝenoj:

– Kiu el vi naĝas plej bone?

Kelkaj loĝ'antoj de Amazonio diras, ke Kurupiro similas kaj al homo, kaj al simio⁵. Ĝi estas forta kun korpo har'kovr'ita. La dentoj estas blujaj aŭ verdaj. Ĝi havas kalkanajn⁶ antaŭe kaj piedfingrojn malantaŭe. Pro tio ĝi post-lasas falsajn paŝo-signoj kaj tiel ĝi facile eskapas⁷ de antaŭ la persekut'antoj⁸.

Kurupiro protektas la arbarojn. Se iu for-hakas arbon sennecese, nur por detrui, ĝi faras, ke la kulpulo perd'iĝu kaj, dum longa tempo, li ne trovu la vojon al sia domo. Ĝi tim'igas kaj mal-san'igas ĉas'iston, kiu mort'igas best'inojn (precipe la grave-dajn⁹) aŭ ties id'etojn, aŭ tiun, kiu mortigas beston, kiun li ne manĝos. Subita bru'ego aŭ sono, kvazaŭ produkt'ita de fal'anta arbo atestas pri la ĉeesto de Kurupiro.

Se, trov'inte tiun mitan¹⁰ est'ulon, la ĉasisto ne faras tion, kion ĝi postulas, ĝi pun'batas la mal-obe'inton, sed se oni plenumas ĝiajn postulojn, la sovaĝulo montros, kion la homo serĉas en la arbaro.

En kelkaj regionoj, la ekologiista¹¹ malgranda mita estulo estas nom'ata Kaaporo kaj ankaŭ ĝia korpo malsamas de tiu de Kurupiro. Laŭ la Muraj indiĝenoj, ekzemple, ĝi ŝajnas nigra knabo, kiu loĝas en arbaro kaj protektas la sovaĝajn bestojn, speciale la porkojn. Kiam ĉasisto kun sia hundo eniras arbaron, Kaaporo, rajd'ante porkon, per longa vergo¹² forkur'igas la bestojn kaj pun'batas la hundon. Ĝi forrabas ankaŭ infanojn kaj malliber'igas ilin en trunkoj kavo-havaj.

Pekim Tenorio VAZ, Brazilo
(Pied'notoj sur paĝo 18)



La unua respondis:

— Ne mi.

La dua diris:

— Mi naĝas plej bone.

Fingro-montr'ante al la dua, la tria diris:

— Ne li naĝas plej bone.

Kiel la aventur'ema Marano sukcesis mal-kovri la indiĝenon, kiu neniam mensogas, kaj tiun, kiu plej bone naĝas?

Evandro de Freitas (Brazilo)

SOLVO sur paĝo 27

Help'vizito al ekster-lando

Ĉu vi ŝatas vojaĝi ekster-landen, gastigi ĉe esperantistoj, ĝui ilian gastamon? Se jes, bone. Sed, de tempo al tempo ĉu vi ne sentas, ke vi iomete ŝuldas al viaj grand'animaj gastig'antoj?

Jen propono por rekompenci. **Volont'ulaj Labor'antoj En Organikaj Farmoj**¹ (angle: **WWOOF** – **Willing Workers On Organic Farms**) validas en multaj landoj. Sur la listo nun troviĝas 600 nomoj el 48 landoj, plejparte el Eŭropo, sed ankaŭ el Afriko, Ameriko, Azio kaj Aŭstralio. Vi povas lerni pri la novaj metodoj en agrokulturo per laboro en tia farmo, kie vi povas gastigi du aŭ tri tagojn, manĝoj inkluziv'itaj, kontraŭ tri- aŭ ses-hora laboro laŭ la bezonoj de la farm'isto.

(Por pli aĝaj kaj mon'havaj homoj ekzistas ebl'eco gastigi en tiaj farmoj kontraŭ antaŭ-aranĝ'ita pago.)

Kial organikaj farmoj?

Por nutri la viv'ant'ajojn de la tuta mondo, plej gravas la kvalito de la akvo, sed ankaŭ tiu de la grundo. Pro dis-ĵet'ado de kem'ajoj sur la farmkampoj (ŝajne por for-igi trud'bestojn kaj trud'herbojn) la homo mort'igas la plej gravajn elementojn de la natura grundo. Pro tio ek-estas nova movado: kresk'igi niajn manĝ'ajojn tute nature, organike, bio-dinamike kaj tiel pli nutro-done. Ĉi tiu movado nun kreskas ĉar, pro multaj novaj malsanoj en la popolo, scienc'istoj konsci'iĝas pri eraroj far'itaj nur dum la dudeka jar'cento, sed kun gravaj konsekvencoj por la homaro.


Informoj pri WWOOF-oj estas akir'eblaj, kutime, en volontul'organizoj, student'informejoj, organik'vend'ejoj kaj similaj.

Jennifer BISHOP
(Aŭstralio)

1. kampoj, kie oni kulturas kresk'ajojn sen artaj kem'ajoj.



Protektu
la naturon:
grundon,
akvon,
aeron!



Inic'ado¹ ĉe peŭloj

Je la signalo de arbitraci'anto² deko da 12-jaraj knaboj – star'antaj kiel statuoj kaj vest'itaj nur per pantalon'eto – sin-sekve ricevas po tri fortajn batojn sur la bruston per mal-dika bastono. Ili eĉ ne ĝem'etas.

Tuj poste, la parencoj levas la bat'itojn kun fortaj aplaŭdoj kaj ĝojaj krioj. La parencoj pudras ilin blankaj.

La batintoj, sia-vice, premas la kapon per la dekstra brako kaj rigardas al-flanken. Ankaŭ ilia brusto estas tute nuda.

Tiam la batitoj kuraĝe prenas bastonojn kaj reciprokas la batojn. Ĉiuj brustoj sangas, sed larmoj ne falas. Larmoj signifas hont'egon por la parencoj.

Laŭ la spekt'antoj la baston'batoj estas nur ŝajnaj. Ne la batitoj suferas, sed ilia brut'aro aŭ ilia vilaĝo.

Post la knaboj ankaŭ la adoltoj al-iĝas. Sekvas parado de bastonoj. Per sia unu-metra nigra bastono ĉiu batas ĉion, kio mov'iĝas. La vid-al-vid'ulo sin defendas kontraŭ la batoj per alia bastono.

Ĉio fin'iĝas en festa etoso per danc'ado sub sonoj de subbrakaj tamburoj.

La peŭloj estas de-naskaj paŝt'istoj, kiuj migras kun siaj brutaroj tra la norda regiono de okcidenta Afriko. Tre mal-riĉaj, ili ĉiam pied'iras kaj ne konas lernejojn. Per tiu inicado la gento preparas la knabojn kuraĝe al-fronti la mal-facilajn viv'kondiĉojn de la gento.

Tiu ĉi ceremonio okazas ĉiu-jare en la norda parto de Togo-lando, kie loĝas peŭla komun'umo. La ceremonio okazas sur publika placo, antaŭ divers'genta spektant'aro, en la seka sezono, kiam blovas sek'ega vento kun tre alta temperaturo.

Mensah A. ATTIOGBE-AGBEMADON (Togolando)

1. inici: en-konduki en la sekretojn de vivo, instruo / 2. ĉi tie: inici'estro.


Nov'ajoj el fabellando

Dum la lasta tempo pli-offiĝas okazoj, ke murd'emaj lupoj faras fi-agojn

Certe, ĉiu el vi ankoraŭ memoras pri la malgranda Ruĝ'ĉapulo kaj ŝia lit'malsana av'ino, kiuj estis for-mang'itaj de lupo² kaj povis esti sav'itaj nur pro ĝusta-tempa kaj kuraĝa helpo de ĉas'isto.

La terura atako de lupo kontraŭ la familio Kaprin, kies viktimoj³ far'iĝis sep infanoj, kaŭzis bruon eĉ mal-proksime trans la limoj de nia lando; kvankam – aŭ ĝuste ĉar – la sep kapr'idaj estis savitaj ankoraŭ en la lasta minuto. Ver'ŝajne estis tiuj miraklaj⁴ savoj, kiuj dis-kon'igis tiujn ĉi okazojn. Sed kiom da similaj krimoj – kaj kun mal-pli feliĉa fino! – okazas krome? Kaj la lupoj fariĝas ĉiam pli kaj pli impertinentaj⁵! Antaŭ nelonge, iu kamp'ar'ano, kiu loĝas antaŭ la pord'egoj de nia urbo,

trovis en sia kelo lupon, kiu for-mang'is tiom da freŝa viando, ke ĝi jam ne sukcesis tra-pasi la kelo-fenestron, tra kiu ĝi en-



iris. Sed ĝia ŝtel'kunulo, vulpo⁶, ankoraŭ povis fuĝi⁷.

Kion – ni demandas – oni intencas fari por fin'fine ĉes'igi tiujn ĉi fiagojn? Ĉu ne estas sufiĉe malbone, ke niaj vojoj kaj stratoj jam ne estas sekuraj? Ĉu la patrinoj ne povas lasi siajn infanojn eĉ unu horon solaj en la (pri-ŝlos'ita) domo? Kio devos ankoraŭ veni ĝis io okazos? Kiel – tiel oni certe raj-

tas demandi – oni ne ven'igas soldatojn por mort'igi la lupojn? Kaj kie – tiel oni devas demandi – estas la multe-glor'ataj (kaj antaŭ ĉio sin mem glorig'antaj) drak'mort-

ig'istoj? Ĉu por ili lupo ne estas sufiĉe inda kontraŭulo? Ĉu publika agnosko kaj ĝenerala dank'emo ne sufiĉas al ili? Ĉu ili ek-prenas la glavon nur, se estas gajn-eblaj reĝid'ino kaj duono de reĝ'lando? Temas pri la sekur'eco de ni ĉiuj! Temas pri la defend'ado kaj bonfarto de niaj infanoj.

Gert PROKOP,
tradukis: Dieter
BERNDT (Germanio)

Ag'ado

"ESPERO"

por eksa Jugoslavio

AL-VOKO

Antaŭ kelkaj semajnoj la Esperanto-grupo en ULM, Germanio, decidis komenci help'adagon por la esperantistoj en Jugoslavio kaj sendis al ili iom da mono.

La grupo nun intencas vast'igi sian agadon kaj est'igi interrilatojn inter esperantistoj en aliaj landoj kaj tiuj en Jugoslavio. Temas pri interurbaj aŭ inter-klubaj rilatoj.

La grupo pretas kun-ord'igi la petojn de Esperanto-kluboj kaj helpi al ili trovi partnerojn.

La grupo havas ankaŭ help'konton (*UEA-konto: scrm-x*), kiun ĝi uzas nur por rekta kaj ruĝa helpo, ekzemple por aĉeti medikamentojn.

Gerald GRUPP, la ĉefa motoro de tiu ĉi agado *deklaras*, ke la grupo ne distingas inter etnoj en sia agado. Li esperas, ke ni ĉiuj, kiuj vivas en normalaj viv'kondiĉoj povos helpi homojn en terura situacio.

Adreso:

Gerald Grupp kaj la Grupo Uim'neŭ-Ulm
Pfeilerstr. 26
D-89231 Neu-Ulm
Germanio

<*Gerald.Grupp@br-dtm.de*>

Ret'adreso:

Kelkaj al-donaj vortoj.

Nun por la plimulto de la vivo ŝajnas sen-espera. Ankoraŭ daŭris la milito, kiam lemanoj en Jugoslavio skribis sur la muro de sia lernejo: *"La pas'inteco estis malbona, la nun-tempo estas terura, dank' al Dio, ni ne havos est'ont-econ"*. Ni, esperantistoj devas scii, ke la vorto Esperanto estas lig'ita al la vorto *espero*. La milito estas mal-amiko de espero. Antaŭ dek-kelkaj jaroj Jugoslavio estis kon'ata kiel lando, kie multaj diversaj nacioj kaj etnoj kun-vivis en paco kaj kie estis multaj aktivaj esperantistoj.

Lasta-tempe, bedaŭr'inde, neniu havis forton halt'igi la kreskon de malamik-eco inter diversaj etnoj.

Ĉiam, kiam milito trafas iun landon, la aliaj pensas, ke tio ne estus ebla en ilia lando. Ne forgesu, ke politiko estas tre kaprica, ŝanĝ'ig'ema.

Ni uzu nian pac'eman rimedon, la internacian lingvon por helpi mal-feliĉ-ulojn!

PIED'NOTOJ de "Novajoj el fabellando" (paĝo 24)

1. murdi: intence mort'igi / 2. hundo-simila sovaĝ'besto, simbolo de malbona ago en multaj fabeloj / 3. sen-kulpaj murd'itoj de per-forto / 4. ne-kred'eble mir'indaj / 5. mal-afablaj, mal-ĝentil'egaj / 6. long'vosta flave ruĝa sovaĝ'besto / 7. for-kuri de antaŭ iu.

© SEPTEMBRO 1999

• Se vi havas al-iron al Interreto, vizitu TTT-ejon <http://esperanto.nu> kaj klaku sur *La angulo*. Tie vi trovas plurajn, kiuj serĉas korespond'amikojn.

• Deziras korespondi tutmonde la 11-jara *Anna Birjulina*, str. F.Lytkina 24-82, RU-634034 Tomsk, Rusio.

• Du 21-jaraj fraŭlinoj serĉas leteramikojn. Skribu al: *Julie Angelette Andrianjatovo*, Casernes Manjakandriana 116, M.G. Madagaskaro.

• Itala instruisto de elementa lernejo serĉas por siaj 9-jaraj infanoj samĝan partneran klason el Eŭropo por reciproka vizito kadre de Programo "Comenius". Limdato: novembro 1999. Adreso: *Leonardo Pampaloni*, vis Pier Cironi 15, I-59100 Prato, Italio. Tel.: 0574/604100.



• 20-jara studentino pri literaturo kaj lingvoj deziras koreskondi pri ĉio. Adreso: *Aneta Velkoska*, "Todor Ĉangov" 31/11 Lisiĉe, MK-91000 Skopje, Makedonio.

• Malgranda grupo de gelemantoj (12-14-jaraj) volas korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Skribu al ilia instruistino: *Marija Jerkovic*, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio.

• 15-17-jaraj lernatinoj korespondus tutmonde. Skribu al: *Laura Lukoŝevičiute*, Taikos gt. LT-4910 Utena, Litovio.

Juna amiko

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj

26-a Jaro, n-ro 3 (90), 1999

Aperas 4 fojojn jare.

Redaktoro: *Géza KURUCZ* (Hítel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)

Ret'adreso: junaamiko@esperanto.nu

Vicredaktoro: *Stefan MacGill* (retadreso: stefan.macgill@galamb.net)

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Södra Rörum pl 455, S-24294 Hörby, Svedio

Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *Lisbet* kaj *Bertil Andreasson* (Svedio), *s-ino Raita Pyhälä* (Finnlando), *s-ino Monique Noël* (Francio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Gennadij Basov* (Rusio), *Bardhyl Selimi Mezini* (Albanio), *Till Dahlenburg* (Germanio), *Rinzo Okumura* (Japanio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Zoltán Kurucz* (Hungario), *Dieter Berndt* (Germanio), *Bill Mak* (Ĉinio); *Michel Nkwiri-kiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah A. Attigbge-Agbemadon* (Togo), *José J. Campos Pacheco* (Kubo)

Irina Nagy (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio) grafikisto

Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Ĉinojn u. 20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

ISSN 0230 1314

Trovu la konvenajn duonojn

Sur la kovr'il'paĝo (p. 28) vi trovas ludon, kiun ni prenis el brazila por-infana suplemento¹ "TRIBUNINHA" [Tribuneto] (31 majo 1999) de la revuo "A Tribuna de Santos" [La Tribuno de Santos]. Ĉar multaj el niaj leg'antoj ne abonas tiun ĉarman leg'indan revu'eton, ĉi-foje ni prezentas interesan lud'eton, kiu certe ne kaŭzos al vi problemojn.

La solvojn vi trovas sur tiu ĉi paĝo, sube. Kontrolu vin.

1. al-don'ajo.

- ◆ *Solve de "Mensogemaj indiĝenoj" (p. 20).* Ĉar la dua kaj tria indiĝenoj sin kontraŭ-diris, oni rimarkis, ke unu el ili diris la veron kaj la alia mensogis. Sekve, la unua mensogis kaj li estis tiu, kiu plej bone naĝis. El tio sekvas, ke la dua mensogis, ĉar li diris: "Mi naĝas plej bone".

Konkludo: La unua ĉiam mensogas, tamen li naĝas plej bone.
La dua ĉiam mensogas.
La tria neniam mensogas.



Luda krucenigo (2/99)

Post la redakto-fino venis al ni pluraj bonaj solvoj de la enigmo "Magia Kvadrato". Jen ili: José de J. Campos Pacheco (Kubo), Nora Seres (Hungario), Marija Mitevska (Makedonio), J. Pauluk (Brazilo), Patrícia Pereira Grechi (Brazilo). Dankon kaj gratulon!

SOLVO DE "Matematika enigmo" (2/99, p.23)
 $99 \cdot 91 = 9009$

SOLVO DE LA LUDO "Trovu la konvenajn duonojn" (p. 28):

A - Ĥ, B - D, C - I, Ĉ - H, E - J, F - Ĵ, G - K, Ĝ - L

Abon'tarifoj de Juna Amiko por 1999 kaj 2000

	NLG	Eŭro	DEM	USD	2-4 abonoj	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	24	10,80	21	15	-33.3 %	-50 %	en la prezo
Tarifo 2	13	6	12	8,50	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	9	4	8	6	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF			Po 480 HUF		420 HUF	—

TROUVU LA KONVENAJN DUONOJN

